

**SE LI AŬSKULTOS VIN, VI ESTOS REAKIRINTA VIAN FRATON –
Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

El la Evangelio laŭ Mateo 18,15-20

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: “Se via frato faris malbonon al vi, admonu lin inter li kaj vi sola. Se li aŭskultos vin, vi estos reakirinta vian fraton. Sed se li ne volas aŭskulti, prenu kun vi unu aŭ du personojn, por ke oni pritraktu ĉion per la atesto de du aŭ tri personoj. Kaj se li eĉ ilin ne aŭskultos, raportu la aferon al la Eklezio; kaj se li ne aŭskultos eĉ la Eklezion, li estu por vi kiel pagano aŭ impostisto.

Vere Mi diras al vi, ke ĉio, kion vi malpermesos sur la tero, estos malpermesata ankaŭ en la ĉielo; kaj ĉio kion vi permesos sur la tero, estos permesata en la ĉielo.

Krome Mi diras al vi, ke se du el vi petos kune ion ajn, mia Patro, kiu estas en la ĉielo, donos tion al ili. Ĉar se du aŭ tri kuniĝas preĝe en mia nomo, Mi estas meze de ili”.

Parolinte pri la skandalo de la komunumo rilate la malgrandulojn, tio estas la flankenmetitoj, kiuj povas skandaliĝi pro tio kion ili vidas ene de la komunumo pri ambicio, supereco, Jesuo nun ekparolas pri la skandalo de la malakordoj ene de la komunumo. Jen kion skribas Mateo en ĉapitro 18, versikloj 15-20.

“*Se via frato*”, temas do pri membro de la komunumo, “*faris malbonon al vi*” ne admonu, kiel estas en tiu ĉi traduko, sed “*lin konvinku*”. Ne estas la pozicio de superulo al malsuperulo por lin admoni, sed estas la pozicio de

frato kiu klopodas rekunmeti la unuecon, kiu klopodas superi la malakordon. Ĉiam memorante kion Jesuo jam admonis, tio estas ke antaŭ ol rigardi la pajleron en la okulo de la frato, necesas atenti ke iu ne havas trabon eniĝintan en la sian (trabo kiu kripligas lian realon).

“Inter li kaj vi sola”, la malakordon do oni ne devas diskonigi, oni devas solvi la problemon. Kaj estas la ofendita persono kiu devas aliri la ofendinton, ĉar tiu kiu eraras, kiu ofendas ofte ne havas la kuraĝon, ne havas la forton pardonpeti. Tiam devas esti la damaĝita partio, la ofendita persono kiu iras al la ofendinto kaj forigas la malakordon.

“Se li aŭskultos vin, vi estos reakirinta vian fraton. Sed se li ne volas aŭskulti, prenu kun vi unu aŭ du personojn”, ili estas tiuj kiuj en la komunumo rolas kiel packonstruantoj, *“por ke oni pritraktu ĉion per la atesto de du aŭ tri personoj.”* Laŭ tio kion asertis la libro Readmono, ĉapitro 19, versiklo 15, pri la valideco de iu atesto.

“Kaj se li eĉ ilin ne aŭskultos, raportu la aferon al la Eklezio”. La greka vorto estas *ecclesia* kiu reprezentas la komunumon de la kunvokitoj, la kunvenon de la kunvokitoj de Jesuo, *“kaj se li ne aŭskultos eĉ la Eklezion, li estu por vi”,* do ne por la komunumo, sed por vi, *“kiel pagano aŭ impostisto”.* Kion tio signifas? Tio ne signifas ke tiu individuo, pro la malakordo, devas esti senigita de la amo de la komunumo, kaj ankaŭ de via amo, sed signifas ke tiu amo estos unudirekta.

Dum en la komunumo la amo estas kaj donata kaj ricevata, ĉar la fratoj interŝanĝas reciproke tiun amon, al la persono kiu kaŭzis la malakordon, la amo devas esti donata samkiel tiu al la malamikoj. Jesuo diros ke oni devas ami la malamikojn, li diros ke oni devas preĝi por la persekutantoj. Tio do signifas ne ekskludi tiun personon de via amo, sed lin ami malŝpare, unudirekte.

Kaj ĉiam parolante pri la temo de la pardono, Jesuo certigas: *“Vere Mi diras al vi, ke ĉio, kion vi malpermesos sur la tero, estos malpermesata ankaŭ en la ĉielo”.* Temas ĉiam pri la pardono, kiu ne pardonas tiu ligas la pardonon de Dio, *“kaj ĉio kion vi pardonos sur la tero, estos pardonata ankaŭ en la ĉielo.”* Temas pri la pardono, la pardono de Dio iĝas aktiva kaj efika kiam ĝi transformiĝas en pardonon al la aliaj. Kiu ne pardonas do ligas la pardonon de Dio, dum tiu kiu pardonas, ĝin malligas.

Ĉe la fino de la ĉapitro, je versiklo 35, fakte, Jesuo diros: *“Tiel ankaŭ mia ĉiela Patro, faros al ĉiu el vi se vi ne elkore pardonos vian fraton”.* Tiu

aserto de Jesuo do ne rilatas la donacon al lia komunumo de la rajto leĝofari pri ĉiu temo en ĉiu kampo, sed esti respondeca en la konsento pri pardono: se vi ne pardonas vi ligas la pardonon de Dio.

Kaj poste Jesuo konkludas: "*Krome Mi diras al vi, ke se du el vi petos kune*" la verbo "peti kune" estas *Sinfoneo*, el kiu la vorto 'simfonio'. Ĝi gravas ĉar ĝi indikas la vivon en la komunumo. Simfonio signifas ke pluraj voĉoj, pluraj muzikiloj ludas farante ĉiu la plejbonon. Ne devas esti unuformeco de voĉoj kaj sonoj, sed estas varieco en la ununura partituro kiu estas tiu de la amo. La amo do estas travivata en diversaj formoj, ĝi floradas en diversaj manieroj.

"Petos kune ion ajn, mia Patro, kiu estas en la ĉielo, donos tion al ili. Ĉar se du aŭ tri..." jen revenas la du aŭ tri kiuj estis favorantoj de la paco, tiuj kiuj iris forigi la malakordon, ilia tasko de packonstruantoj manifestigas la ĉeeston de la Sinjoro. "*... kuniĝas preĝe en mia nomo, Mi estas meze de ili.*"

Kaj revenas la temaro ŝatata de la evangeliisto, tiu de Jesuo, la Dio kun ni. Dum en la hebrea tradicio oni diradis ke kie du aŭ tri kunvenas por lerni la Torahon, la leĝon, la *Shekinà*, tio estas la gloro de Dio estas inter ili, Jesuo anstataŭas la leĝon. La aliĝo al Dio ne plu okazas per iu leĝo fremda al la homo, sed per la identigo kun iu persono: Jesuo, la Filo de Dio, la modelo de la homaro. Jesuo certigas ke kiam estas tiu unuiĝo, kiam solviĝas la malakordoj ene de la komunumo, lia ĉeesto estos senĉesa kaj kreskanta.